... de Junio 1932.

Kara kamarado!

Kun granda ĝojo mi ricevis vian leteron kaj tre dankas. Ĝi estas tre interesa, ĉar la vivo en mia lernejo estas alia. Mi nun volas priskribi la vivon en mia iama lernejo kaj ia pri la historio de tiu ĉi.

La lernejo estas fondita 1843 de princo de Schönburg-Waldenburg. Ĝis 1918 ĝi estis seminaro (estas lernejo por popollernejinstruistoj) Tiam oni fondis la"Oberschule" kaj la "Aufbauschule". (La vortojn oni ne povas traduki en Esperanto) La unua havas 9 klasoj por geknaboj de 10-20 jaroj. Mi vizitis la "Aufbauschule", kiu havas nur 6 klasoj por geknaboj die 14-20 jaroj.

La lernplano en ambaŭ lernejoj estas la sama, nur, ke la lernantoj en la "Aufbauschule" devas lerni dum 6 jaroj, kion la lernantoj de "Oberschule" povas lerni dum 9 jaroj.

Ni lernas: matematikon, (geometrio kaj aritmetiko) geografion, biologion, natursciencon, geologio, ĥemion, fizikon, muzikon, historion, germanan-, latinan-, anglan- kaj francan lingvon kaj havas en semajno 2 horoj gimnastikon. Religionon kaj fortepiano aŭ alian instrumenton lerni estas libervola. Mi de ambaŭ nenion volas scii.

Mia lernejo estas ankaŭ internato, sed nur por knaboj. La knabinoj loĝas en la urbo kaj nur manĝas en la lernejo.

La nombro die la lernantoj en ĉiu klaso estas diversa. Oni havas 30-40 lernantoj kaj ankaŭ nur 10. En mia klaso estis komence 23 kaj nun nur 10.

La lernado komencas somere je la 7a horo kaj vintre je la 8a. Post ĉiu horo estas paŭzo de 10 minutoj sed post la dua horo 20 minutoj, dum kiuj ni en la manĝejo matenmanĝas. Poste ni ankoraŭ lernas 3 horoj kaj tiam ( 12a aŭ 13 a horo) ni tagmezmanĝas. (La manĝaĵo po monato kostas 25 markoj, estas 12 kaj 1/2 rubloj) 3 foje en la semajno ni ankaŭ posttagmezo havas instruadon. Ĝi komencas je la 14a kaj finas je la 17a horo.

La aliajn tagojn ni estas libera ĝis la 14a horo kaj povas promeni en la belan ĉirkaŭaĵo de Waldenburg. Tiam ni laboras 3 horoj sen instruisto en niajloĝĉambroj. (La lernejo havas 10, 1 por knabinoj.) Nun ankoraŭ foje estas libertempo de 17a-18a horo kaj 30 minutoj kaj nun ni vespermanĝas kaj tiam ni laboras ĝis 21a H.

~~Ni knabinoj~~ ira[illegible]s ĝoja, ke ni nun povas dormi. Mi mem sidis la tutan tagon en la lernejo kaj lernis, lernis, lernis, nur, por ke mi havas la plej bonajn censurojn, ĉar la ŝtato nur al la plej bonaj gelernantoj donis stipendiojn.

Trisemajne somere kaj kvarsemajne vintre la gelernantoj povas viziti siaj gepatroj. De mia loĝloko ĝis Waldenburg estas nur 20 kilometroj, tial mi ĉiu semajne biciklis hejmen. Tie mi ekkonis la komunistan ideon, de kiu mi ĝis tiu tempo nur sciis, ke la komunistojvolas forpreni de la homaj la apartenaĵo, kaj, kaj la komunistoj estas tre malbonaj homoj, mortigantoj kaj homoj, kiuj ne volas labori. Nun mi tre multe legis pri komunismon, faŝismon kaj pri la Sovet-Union.

Kiam mi devis forlasi la lernejon mi jam estis komunisto. Mi aliĝis komjunularon de Burgstädt kaj baldaŭ estis funkcionistino de virindemandoj. Marte mi fondis lokgrupon en mia loĝloko kaj nun estas mi politika gvidantino de komjunularo en Göppersdorf kaj partiagitpropfunkcionistino de la administrardistrikto Burgstädt (12 lokgrupoj).

Vi skribis, ke vi ankaŭ lernas la germanan lingvon. Mi havas ~~xxkxx~~ amikon, kiu ne povas Esperanton kaj tre volonte deziras korespondi germane kun rusa kamarado. Cu vi ne scias iu de viaj kunlernantoj, kiu konsentas, korespondi germane? Mi petas, donu al mi adreson en via plej proksima letero.

Mi salutas vin per la germanan batalsaluton

Ruĝfronton.
Via germana kamaradino
Charlotte Raŭschenbach.

Germanio, Saksio
Göppersdorf/Burgstädt
Charlotte Raŭschenbach